

Johann Wolfgang von Goethe,
Trovita

tradukita de Antoni Grabowski

Mi foje arbaron
Promene eniris,
Kaj serĉi nenion
En penso deziris.

Mi vidis, en ombro
Jen staras floreto:
Steleto lumanta
Aŭ blu-okuleto.

Mi volis ĝin ŝiri,
Sed plore ĝi diras:
“Ĉu por ke mi velku,
Vi tial min ŝiras?”

Do mi ĝin elfosis
Kun radikareto,
Kaj portis al mia
Ĝarden' ĉe l' dometo.

En loko trankvila
Plantite karese,
Ĝi kreskas, burĝonas,
Kaj floras senĉese.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.

Johann Wolfgang von Goethe,
Trovita

tradukita de Manfred Retzlaff

Mi tra arbaro
Sencele iris
Kaj trovi ion
Mi ne deziris.

Ĉe l' vojo vidis
Mi etan floron,
Kaj ege tuŝis
Ĝi mian koron.

Kaj kiam volis
Mi ĝin deŝiri,
„N rompu min!“, mi
Ĝin aŭdis diri.

Kaj mi singarde
Ĝin elterigis,
Al mia domo
Ĝin translokigis.

Alialoke
Ĝi nun kreskadas,
La eta planto
Kaj plu floradas.

*Traduko de la Germana poemo “Gefunden” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.*

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)